ĈIELENPRENO – 15-an de aŭgusto 2010

LA POTENCULO FARIS AL MI GRANDAĴOJN: LI ALTIGIS HUMILULOJN – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk 1,39-56

Kaj en tiuj tagoj Maria leviĝis kaj senprokraste vojaĝis en la montan regionon, en urbon de Judujo; kaj enirinte en la domon de Zeĥarja, ŝi salutis Elizabetan. Kaj kiam Elizabeta aŭdis la saluton de Maria, la infaneto eksaltis en ŝia ventro.

Kaj Elizabeta pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj ŝi levis sian voĉon per laŭta krio, kaj diris: Benata vi estas inter virinoj, kaj benata estas la frukto de via ventro. Kaj pro kio okazas al mi ĉi tio, ke la patrino de mia Sinjoro venas al mi? Ĉar jen kiam la voĉo de via saluto venis en miajn orelojn, la infaneto ĝoje eksaltis en mia ventro. Kaj feliĉa estas ŝi, kiu kredis, ĉar plenumiĝos tio, kio estas dirita al ŝi de la Eternulo" Kaj Maria diris:

"Mia animo altigas la Eternulon, kaj mia spirito ĝojis en Dio, mia Savanto, ĉar Li rigardis la humilecon de Sia sklavino. Ĉar jen de nun ĉiuj generacioj nomos min feliĉa. Ĉar la Potenculo faris al mi grandaĵojn, kaj sankta estas Lia nomo. Kaj Lia boneco estas por ĉiuj generacioj al tiuj, kiuj Lin timas.

Li montris forton per Sia brako, Li dispelis fierulojn en la penso de ilia koro. Li malaltigis la potenculojn de iliaj tronoj kaj Li altigis humilulojn. Malsatulojn Li plenigis per bonaĵo, kaj riĉulojn Li forsendis malplenaj.

Li helpis Sian servanton Izrael, memorante Sian korfavoron, kiel Li parolis al niaj patroj, al Abraham kaj al lia idaro eterne".

Kaj Maria loĝis ĉe ŝi tri monatojn, kaj reiris al sia domo.

Luko prezentas Marian kiel modelon de kredanto. Kaj fakte li vidas en ŝi la keston de la nova interligo. La kesto estis la ligna ujo kiu entenis la tabelojn de la leĝo. Do Maria reprezentas la keston de la nova interligo, kiu entenas Jesuon, la Dian donacon al la homaro.

Tuj post la anunciacio, skribas la evangeliisto en la unua ĉapitro de sia evangelio, versiklo 39, *"Kaj en tiuj tagoj Maria leviĝis kaj senprokraste vojaĝis en la montan regionon en urbon de Judujo*". Por atingi Judujon de Nazareto estis du ebloj, aŭ la plej komforta, facila kaj certa Jordana valo, aŭ la pli riska – kaj pro tio ĝi estis kutime evitata – montara zono de Samario.

Nu Maria, kiu estas graveda je Jesuo, ne hezitas: la deziro manifesti tiun vivplenecon kiu estas en ŝi pulsanta – en la amo oni donas la servon por la aliaj – estas pli forta ol propra sekureco. Maria endanĝerigas sian propran sekurecon pro la bezono porti vivon, porti la servon, al la parencino de Judujo.

Do ŝi endanĝerigas sian propran vivon pasante laŭ la montara regiono: "*enirinte en la domon de Zeĥarja, ŝi salutis…"* kaj ni estus atendintaj ke Maria salutus la dommastro. Ne! Zeĥarja estas pastro, kaj kiel tia li estas rezista al la agado de la Spirito kaj do Maria ne povas adresi al li la saluton. La saluto de Maria iras al la virino, Elizabeta, en kiu, samkiel en ŝi, pulsas nova vivo.

Kaj la evangelisto fruigas en tiu agado tion kio estos poste la misio de Jesuo, nome bapti, mergi ĉiun individuon en la Sanktan Spiriton, tio estas en la plenecon de la Dia amo. Fakte "*Elizabeta pleniĝis de la Sankta Spirito*" kaj ŝi impete eldiras laŭdon al la Sinjoro, en kiu elstaras la vortoj: "*Kaj pro kio okazas al mi ĉi tio, ke la patrino de mia Sinjoro venas al mi?".*

La evangeliisto prenas tiun esprimon de reĝo Davido, en la dua libro de Samuelo, ĉapitro 6, versiklo 9, kie Davido diras: "*Kiamaniere venos al mi la kesto de la Eternulo?"* Do en Maria Luko vidas la keston de la nova interligo, ne tiu bazita sur la leĝo, sed tiu bazita sur la akcepto de lia amo. Kaj Elizabeta impete eniras en la feliĉecon rilate al Maria "*Kaj feliĉa estas ŝi, kiu kredis, ĉar plenumiĝos tio, kio estas dirita al ŝi de la Eternulo".*

Tio estas feliĉeco por Maria sed ankaŭ riproĉo por Zeĥarja. Se Maria estas feliĉa, tio estas ĉar ŝi kredis; Zeĥarja, la pastro, edzo de Elizabeta, ne estas feliĉa, tio estas li ne estas feliĉa ĝuste ĉar li ne kredis.

Kaj krome la evangeliisto preterlasas en la antikva origina teksto indiki la subjekton, poste malfrue oni metis Maria-n, sed en iuj tekstoj estas Elizabeta, ĉar la evangeliisto kunigas la du virinojn en iun himnon je laŭdo al la Sinjoro, iu Dio kiu intervenas en la historion kaj ĉiam troviĝas flanke de la malriĉuloj, flanke de la humiluloj, flanke de la humiligitoj.

Iu Dio kiu estas ĉe la flanko de la subprematoj kaj neniam kun la subpremantoj. Kaj fakte oni memoras la liberigon de la Eliro "*Grandaĵojn*", grandaj aferoj estas teknika vorto per kiu oni indikis la liberigon de la egipta sklavigo, "*faris por mi la potenculo*", ne la ĉiopova. Dio estas konata kiel la potenculo, ĉar… poste pli poste li diras "*li renversis la potenculojn de iliaj tronoj*".

Kiam oni kredas je unu nura potenculo, la aliaj potenculoj ne plu havas sian tronon. Kredi je unu nura Dio kiu regas la vivon de la homoj signifas forpreni tiun regadon de la homoj kiuj pretendas regi la aliajn personojn. Do en tiu ĉi himno, konata kiel Magnificat, de la unua latina vorto, la esperoj de la israela popolo vidos en Jesuo kaj en liaj disĉiploj, en ĉiuj liaj sekvantoj, ilian realigon.

Kaj fakte la evangeliisto fruigas la feliĉecojn: “*Li plenigis per bono la malsatulojn*” poste Jesuo diros “Feliĉaj la malsatantoj ĉar ili estos satigataj”, “*Kaj li resendis la riĉulojn malplenmane*”. La riĉeco estis konsiderata beno en tiu kulturo. Por Jesuo kontraŭe, ne, ĝi estas frukto de egoismo kaj frukto de avideco kaj Jesuo priploras kiel mortintojn la riĉulojn “Ve al la riĉuloj”.

E si conclude questo inno con l’espressione *“Maria rimase con lei circa tre mesi e poi tornò a casa sua”.*

Kaj tiu himno konkludiĝas per la esprimo: “*Kaj Maria loĝis ĉe ŝi tri monatojn, kaj reiris al sia domo”* .

Sama esprimo kiel tiu kiu troviĝas en la dua libro de Samuelo, ĉapitro 6, versiklo 11, “*kaj la kesto de la Eternulo restis dum tri monatoj”* , ĝuste kiel Maria, “*en la domo de Obed-Edom, la Gatano; kaj la Eternulo benis Obed-Edomon kaj lian tutan domon”.*

En la ĉeesto do, de Maria, la kesto de la nova interligo, en kiu estas entenataj ne la tabeloj de la leĝo, sed Jesuo, amesprimo de Dio por la homaro, kiu invitas al nova rilato de la homoj kun Dio, reprezentiĝas la beleco de la bona sciigo de Jesuo. Ĉien ajn la kredanto, samkiel Maria, iru kaj restu, tiu estas fonto de beno por la personoj kaj por la tuta domo.